# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 4 (871) • 2008 •

DIA REGNO

ISSN 0167-9554








## KELI-KONGRESO EN PRIBYLINA

DIA REGNO 100 JAROJ








## KELI

**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*



**Prezidanto**: Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021;
💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel Polnický;
✉ Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio;
✆ +420 325 615 651;
💻 Cea.polnicky@quick.cz

**Kasisto**: Siegfried KRÜGER
✉ Claudiusweg 10,
DE 74074 Heilbronn, Germanio;
✆ +49 7131 162688;
💻 siegfriedkrueger@arcor.de



**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI: 5506132.

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

## DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
✉ Västergårdsg 15; 256 64 Helsingborg; Svedio;
✆ +46 (70) 2004574;
💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Éva FARKAS -TATÁR

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel Polnický
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec


## ENHAVO


| | |
|---|---|
| La Dia Regno | 75 |
| Raporto pri la KELI-kongreso | 82 |
| Bildgalerio de la KELI-kongreso | 85 |
| KELI dum la UK en Roterdamo | 86 |
| Dia Regno akompanas kunvojaĝantojn al Dia Regno | 88 |
| Ĉu ekumenismo minacas la fidelecon al nia eklezio | 89 |
| Neordinara travivaĵo | 91 |
| Recenzo de duakanonaj libroj 3 | 92 |
| Pri Paolo | 93 |
| Informetoj | 94 |
| Nekrologo Karl Buremo | 94 |
| Nekrologo Pavel Tichý | 95 |
| Ni kunigu la manojn | 96 |


## REDAKTORAJ VORTOJ

Revenante hejmen post iu Esperanto-kongreso mi ĉiam estas plena de ĝojo kaj inspiro por plia agado. La renkontiĝo kun (mal)novaj konatuloj estas gajiga. Revenante hejmen por fari novan numeron de DR estas same gajiga ĉar mia sako (=reta poŝtkesto) estas plena de fotoj kaj artikoloj farante mian taskon facila. En la nuna numero vi trovos artikolojn kaj kompreneble multajn fotojn de la ĉi-somera KELI-kongreso. Bedaŭrinde ne eblis enmeti ĉiujn fotojn. Tamen kelkaj aliaj kontribuoj ankaŭ trovis sian lokon en la nuna DR.

Sed ni ankaŭ rigardu antaŭen. Kio ŝanĝos aŭ okazos ĝis sekvontjare? Certe ni povas fari pli por atingi niajn celojn; disvastigi nian kredon kaj Esp-on al kristanoj. Facile oni konstatas ke nia KELI bezonas pli da membroj.

# La Dia Regno

Pavel Klimeš, Ĉeĥio

Oni ofte diras, ke profetaj libroj de la Malnova Testamento donas la pli bonan fundamenton por demandoj de la sociala justeco ol la plimulto de la NovaTestamento. Ni rigardu! Paŭlo okupas sin precipe pri la interna vivo de nove fondataj ekleziaj komunumoj, kaj nomas ilin korpo de Kristo. Ankaŭ Johano vekas impreson, kiel li interesiĝus precipe pri la amo inter kristanoj kaj ke li ne vidas reston de la mondo. La Apokalipso malbone parolas pri demona ŝtato, sed tiu ĉi libro estas tro malproksime de la centro de la Nova Testamento. La Dia Regno estas la centra temo de la prediko de Jesuo.

Laŭ la statistiko la ideo „regno' (basileia) estas en la Nova Testamento 162-oble, en la sinoptikaj evangelioj 121-oble. Ĉi tio pravigas nin paroli pri la ideo de la Dia Regno kiel pri teologia temo.

> La Dia Regno estas la centra temo de la prediko de Jesuo

Ni vidu, kiel ekzemple laŭ Marko Jesuo uzas tiun ĉi terminon: Ĝi estas temo de lia unua publika prediko: *„Kaj post kiam Johano estis arestita, Jesuo iris en Galileon, predikante la evangelion de Dio, kaj dirante: La tempo jam plenumiĝis, kaj la regno de Dio alproksimiĝis; pentu, kaj kredu al la evangelio."* (Mar 1,14–15). Ni poste revenos al tiuj ĉi versikloj.



Fotis: Karl-Heinz Schaeffer

La regno estas enhavo kaj celo de multaj paraboloj (Mar 4,11.26.30). Ĝi venkas la morton kaj gvidas etikan agadon (9,1.47). Al ĝi oni devas alveni kiel infano. La riĉuloj estas malproksime de ĝi (10,14.15. 23–25), sed tiu, kiu scias, ke la plej granda ordono estas la amo, estas proksime al ĝi (12,34). Eŭkaristia festeno antaŭakceptas ĝian alvenon kaj celas al ĝi (14,25). La viro, kiu zorgas pri la morta korpo de Jesuo, apartenas al tiuj, kiuj serĉas la Dian Regnon (15,43). Ni povas konstati, ke la Regno de Dio prezentas la plej malproksiman horizonton de prediko de Jesuo, laŭ predikaj valoroj kaj ankaŭ en nia tempo kaj en eterneco.

**Kia estas la enhavo de la ideo de la Dia Regno en la predikoj de Jesuo?**

Li ne alportas ian difinon, do restas ia malcerteco aŭ eĉ sekreto (Mar 4,11), ĉar Jesuo parolas pri la Dia regno en paraboloj. Sed tamen ni ne restas sen helpo. Ni havas la Malnovan Testamenton, judan

apokalipsan, rabenan kaj targuman literaturon kaj unu klaran versiklon de Paŭlo. Sed antaŭe ni devas pli atente pensi pri la programaj versikloj de Mar 1,14–15.

La unua versiklo diras du aĵojn: ĝi komencas per la preciza tempo (*post kiam Johano estis arestita*) kaj indikas predikon de Jesuo kiel la ĝoja sciigo. Tiuj du esprimoj faras kadron por daŭrigo. La sentenco *„La tempo (*kairos*) jam plenumiĝis"* diras, ke alvenis la limŝanĝo en la historio de savo, la eksterordinara momento de komenco de la nova epoko.

> Lia volo instali justecon kaj sanktecon en tiu ĉi epoko efektiviĝos tiel sur la tero, kiel ankaŭ en la ĉielo. La unua homa respondo al tio devas esti logike pento pro la faritaj malbonoj kaj nova sinturno al la Dia volo

Malantaŭ tiu ĉi imago estas juda apokalipsa konvinko, ke historio ne estas senfina ripeto de la sama ciklo, sed ke ĝi celadas sub la Dia gvidado antaŭen al ia certa celo. Ĝi trairas variajn etapojn aŭ „eonojn". Plej ofte oni vidas tiujn etapojn tiel: de Adamo al Abrahamo, de Abrahamo al Moseo, de Moseo al Davido, de Davido al la ekzilo kaj de la ekzilo al Mesio. Lia alveno estas komenco de la fina epoko. La historio iras al sia celo kaj tiu ĉi procezo estas sub la Dia gvido kaj zorgo, aŭ, se vi volas diri, la historio havas sian sencon kaj celon.

La unua parto de la versiklo 15 diras, ke la homoj estas jam preparataj por la alveno de la nova epoko, ĉar la tempo plenumiĝis, kiun Dio estas preparita, ĉar plenumiĝis necesaj kondiĉoj (vidu Gal 4,4), kaj ke la nova epoko jam komenciĝis per la arestado de Johano la Baptisto kaj per la publika debuto de Jesuo. La versiklo finiĝas per ordono kredi al la evangelio. Tio signifas, ke prediko de Jesuo kaj Dia enkonduko de la fina mesia erao estas objektoj de la fido kun forta espero kaj el ili nenio estas videbla. La konvena respondo de la homo estas konfido.

Nun ni iru al la centro de la versiklo: *„la regno de Dio alproksimiĝis; pentu"*, Jesuo decidis montri tiun eonon kiel la tempon, en kiu la justa kaj sankta Dio de Izraelo plene transprenas regadon sur la tero. Tio signifas, ke tiun ĉi novan epokon eblas nomi regno aŭ regado de Dio. Lia volo instali justecon kaj sanktecon en tiu ĉi epoko efektiviĝos tiel sur la tero, kiel ankaŭ en la ĉielo. La unua homa respondo al tio devas esti logike pento pro la faritaj malbonoj kaj nova sinturno al la Dia volo.

Nun mankas unu problemo. Tio estas la interpretado de la tempo el la verbo „alproksimiĝi" (en greka originalo „énkiden" de verbo „engizó"). Tradukoj povas esti du: 1) „la Dia regno alvenis kaj jam estas ĉi tie", aŭ 2) la „Dia regno alvenas, tio signifas, ĝi alproksimiĝas, ĝi estas jam proksime, sed ankoraŭ ĝi ne alvenis. ". Tio estas la bona traduko de la verbo „engizó". Kontraŭ tio staras la versiklo de Mateo 12, 28: *„Sed se mi per la Spirito de Dio elpelas demonojn, tiam la regno de Dio estas veninta sur vin."*

Ni havas ankoraŭ unu veran problemon. La verbo en Marko 1,15 signifas „estas proksima" kaj ne „alvenis" En la prediko de Jesuo la akcento de la futuro estas la ĉefideo. En la Preĝo de la Sinjoro

li instruas nin preĝi *„venu via regno, fariĝu via volo”*. Ni petas, por ke tiuj promesoj plenumiĝu en la estonteco. En tiu ĉi kunteksto ni povas konstati, ke la vortoj el Mat 12,28 estas konkretaj rilate al ekzorco de Jesuo. Jesuo diras, ke Dio funkciis en la historio kaj malfermas la novan epokon de historio, kiu enfluos en la Dian regnon. Ĝi jam ĉeestas kiel ĝermo kaj kiel signo en la persono de Jesuo Kristo, sed ĝia plena sociopolitika realizado estos ankoraŭ en la estonteco. La fundamenta tempa horizonto de proklamo de la Dia Regno estas en la estonteco.

La Malnova Testamento neniam uzas terminon „la Dia Regno”, sed plene sentas, ke Dio, Dio de Izraelo, estas la reĝo. Li estas Sinjoro de ĉiu kreitaĵo, sed li elektis en sia suverena libereco nur unu nacion inter ĉiuj kaj decidis fari kontrakton kun ĝi. Li estas reĝo plene justa kaj Sinjoro de ĉiu justeco, kaj li volas, ke ankaŭ lia homaro servu al li precipe per sankta diservo, per poetaj kantoj (psalmoj) kaj per faro de justeco. En la frua apokalipso li transdonis sian suverenan Dian povon al la Filo de Homo, kiu kunportis ĝin sur la teron kaj akceptigis ĝin (Danielo 7,13-14). Tiu ĉi ideo estas grava rilate al la pensado kaj laboro de Jesuo.

**Kio estas la signifo de tiu ĉi ideo?**

La Biblio proksimiĝas al la defino de ideo de la Dia regno en loko, kie ni ne atendus tion. En la epistolo al la Romanoj staras: *„Ĉar la regno de Dio estas ne manĝado kaj trinkado, sed justeco kaj paco kaj ĝojo en la Sankta Spirito.”* (Rom 14,17). Tiun ĉi tekston kutime oni komprenas malbone, nur rilate al privataj, individuaj kaj pure spiritaj benoj, sed tio ne sufiĉas. La paco estas ordo kaj socia ordo, kontraŭo de milito, justeco estas la vera justeco, do la fundamenta virto de sociaj rilatoj; kaj la ĝojo, kvankam ĝi enhavas individuan dimension, ĝi povas signifi ankaŭ ĝojiĝon pro la beno de paco kaj justeco. Tiuj ĉi benoj enhavas ĉiajn bonojn de la progresema civilizacio, ekzemple rajton ekkoni la veron, respekti konatan veron, okupiĝon pri scienco kaj arto, feliĉan familian vivon kaj ekonomian sekurecon per la kunlaboro ktp.

**Kie troviĝas la Regno de Dio?**

El vizio en Dan 7, kiun akceptis ankaŭ la Nova Testamento, estas videble, ke la Regno origine estas ĉe la Eternulo, ĉiela Patro, kaj kiam ĝi alvenas, ĝi descendas malsupren sur la teron. La Regno do signifas en sia plena, fina realizado, la realiĝon de tiu ĉi mondo, kvazaŭ ĝia komenco estas transcenda. Tiu ĉi vidado de la Dia Regno estas inter kristanoj la plej ofta, ĉar multaj el ili interŝanĝas ĝin kun ĉielo kaj komprenas ĝin kiel individua kaj kolektiva celo en la momento de nia morto. Pure spiritan tipon de Dia Regno ni trovas en Luk 17,20–21 kaj en Joh 18, 36, kie Jesuo diras: *„Mia regno ne estas el ĉi tiu mondo; se mia regno estus el ĉi tiu mondo, miaj servantoj bataladus, por ke mi ne transdoniĝu al la Judoj; sed nun mia regno ne estas el ĉi tie.”* Tiu ĉi traduko vekas impreson, ke la regno de Jesuo havas nenion komunan kun tiu ĉi mondo. La greka teksto kontraŭe pruvas doktrinon de sinoptikaj evangelioj, ĉar la greka prepozicio „ek” signifas „el”. La plej bona traduko estas: „Mia regno ne originas el tiu ĉi mondo“.

Tio signifas, mia Regno ne alvenas de ĉi tie, tie ĉi ĝi ne havas sian komencon kaj devenon. Tio ne signifas, ke tien ĉi la Regno ne povus alveni, do eblecon, kiun sinoptikuloj instruas kaj por kio senĉese preĝas. Ekzemple la evangelisto Mateo uzas la terminon „la ĉiela regno”. Por li kaj palestinaj legantoj estas klare, ke li pensas „la Dian Regnon” sed por malfruaj paganokristanoj tio signifis „ĉielo”. La pia juda uzado de aliaj vortoj faris tie ĉi miskomprenon.

**Kiam la Regno alvenos?**

Je tiu ĉi malfacila demando ekzistas en diversaj bibliaj libroj ankaŭ diversaj respondoj, sed komuna estas la penso, ke la Regno estas eskatologia (je la fino de apartenanta tempo) la dono de Dio, kiun homoj ne povas solaj konstrui. Nun restas demando, ĉu tiu ĉi dono jam alvenis al ni en la persono de Jesuo (nuntempo), aŭ ĉu ĝi ankoraŭ alvenos kun la Filo de Homo (estonteco). Nuntempaj aŭtoroj trovas ŝlosilon al solvo en la Preĝo de la Sinjoro (Mat 6,10), kie Jesuo instruas nin preĝi: *„venu via regno”*. Tiu ĉi peto ne havus signifon, se la Regno jam estus tie ĉi. Kiam Jesuo diras, ke 1a Regno alproksimiĝis, tio signifas, ke ĝi ankoraŭ ne alvenis en plenumeco, sed ĝi estas vere atingebla. Grava sciigo restas, ke la Dia Regno alvenos en proksima estonteco.

**Kaj kiu efektivigos la Regnon en tiu ĉi tero?**

Laŭ Dan 7 tiu estas evidente la Filo de Homo. En la evangelioj tio ne sonas jam tiel klare, ĉar estiĝas demando de la rilato inter Filo de Homo kaj Jesuo. Tradicie oni supozis, ke Jesuo sin mem identigis kun Filo de Homo kaj ke li en sia dua reveno en gloro alportos ankaŭ la Regnon. Tiu ĉi koncepto havas kelkajn problemojn. Dum zorgema studado vekas versikloj Mar 8,38 kaj Mar 9,1 la impreson, ke 1) kvankam Jesuo esprimas la proksiman kaj vere deciditan kunligon inter si kaj Filo de Homo, ili ne estas plene identaj; 2) ekzistas kunligo inter alveno de Filo de Homo *„en la gloro de sia Patro kun la sanktaj anĝeloj”* kaj *„la regno de Dio veninta en potenco”*. Ni devas diri, ke en la plej malnovaj fontoj daŭras la malcerteco. Pro tio ni decidis sekvi la vojon de la lastaj redaktoroj de evangelioj kaj de la Apokalipso de sankta Johano. Laŭ ili estas la Regno instalata de Jesuo kiel signo, anticipo (prolepsis) kaj promeso, kaj en tiu ĉi signo kaj promeso daŭrigas tion la Sankta Spirito kaj la eklezio, ĝis la Regno definitive venkos dank' al Jesuo kiel reviviga Sinjoro.

Ni povas konstati, ke la Dia Regno en predikoj de Jesuo estas socia. Ĝi ne estas precipe individua, interna aŭ spirita realo. La signo por rekoni la plenan regadon de Dia Regno estos la justeco. En tio baziĝas la realigo de Dia regado sur la tero.

**Kion ni povas fari por la alveno de Dia Regno?**

Laŭ Mat 6,10 ni devas preĝi: *„venu via regno”*. Ni el tio pensas, ke la Regno estas dia, transcenda realo, kiu apartenas al Dio mem, kaj la homo sola ne povas ĝin rekte krei aŭ kontroli. Tio estas tre grava konstato, ĉar multaj homoj en la historio identigis la Dian Regnon kun siaj propraj politikaj aŭ ekleziaj projektoj kaj tiu ĉi malsana konkreta identigo gvidis al malesperigaj situacioj kaj ofte al

katastrofoj. Necese estas gardi la distancon inter nia klopodo kaj definitiva dono de Dio. Sed ĉiam restas la demando, kion ni povas kaj rajtas fari nun. Certe ni povas preĝi, tio estas la unua tasko. Ni povus sopiri por ĝi, *„malsati kaj soifi justecon"* (Mat 5,6). Utilan konsilon, uzatan en Nova Testamento, ni trovas ĉe rabenoj. Ili diris, ke bonaj agoj, precipe, kiam ilin faras la tuta Izraelo, rapidigos la alvenon de Dia Regno. Rabeno Levi (300 post Kristo) diras: *„Kiam Izraelidoj nur unufoje plenumus sabaton tiel, kiel oni povas, la filo de David tuj alvenus."* Kiam ĉe

Necese estas gardi la distancon inter nia klopodo kaj definitiva dono de Dio. Sed ĉiam restas la demando, kion ni povas kaj rajtas fari nun.

unuaj kristanoj unuafoje aperis la angoro pro prokrasto de la dua alveno, tiam la aŭtoro de la dua epistolo de Petro skribas al ili kuraĝigan leteron, en kiu uzas rabenan terminon *„atendante kaj akcelante la alvenon de la tago de Dio"* (2 Pet 3,12). Ni pensas, ke la aŭtoro havis la saman ideon kiel la rabenoj, ke la tagon de Dio aŭ lian reĝadon ni ne povas rekte farigi, sed ni povas ĝin antaŭprepari (Mat 3,3) per la preĝo kaj per laboro por pli bonaj kondiĉoj por ĝi, alivorte per alproksimiĝo al tiu ĉi alta idealo.

La demando pri la proporcio de la homa kaj la dia iniciato en la alveno de la Dia Regno havas la saman solvon kiel la klasika teologia problemo inter la rilatoj de Dia graco kaj nia libera respondo en fido por nia savo. Ambaŭ estas necesaj, sed inter Dio kaj ni ne estas egaleco. Li estas la unua kaj suverena. Li akceptis iniciaton en la persono de Jesuo Kristo. Lia tasko estas alporti la Regnon en plenumeco. Sed li ne devos ĝin trudi al nepreparitaj kaj rifuzaj homoj. Por tio nia tasko estas forigi malhelpilojn kaj prepari la mondon por la alveno de la Regno.

La temo de la Dia Regno donas teologian fundamenton al la zorgo de socia justeco kaj al similaj aktivadoj, ĉar ĝi turnas nian atendon al instalo de Dia justeco sur la tero. Ne eblas identigi la Regnon kun iu homa programo, kvazaŭ tiu povas ĝin plirapidigi. Realizado de la Dia Regno restas en manoj de Dio. Kristanoj rajtas rigardi la estontecon kun espero, insista sopiro kaj persista preĝo, sed ankaŭ kun sia intelekto, planoj kaj projektoj. Per tio ili ne kreas la Regnon, sed preparas kondiĉojn por ĝi.

Tio, kion ni jam diris, apartenas al biblia teologio staranta sur evangelio de Marko kaj sur la fonto Q, tio signifas sur la plej malnovaj tavoloj de evangelia tradicio. Ni volis stari plej proksime al la historia Jesuo. Sed nun estos utile prezenti ankoraŭ kelkajn specifajn aspektojn de la prediko pri la Regno ĉe Mateo kaj Luko.

### Ĉe Mateo estas du apartaj akcentoj

Tio estas lia tipa kunligo de eskatologio kaj etiko kaj lia aparta intereso pri la Eklezio. La unua motivo ne estas nur ĉe Mateo, ni trovas ĝin en ĉiuj evangelioj, sed ĉe Mateo tio estas pli funda. La dua temo, la Eklezio, troviĝas nur ĉe Mateo. Luko parolas pri ĝi en la Agoj kaj Johano parolas pri ĝi per sia simbola maniero (vinberarbo

kaj branĉoj, ŝafoj kaj ŝafejo ktp)

La rilaton inter la Regno kaj la etiko ni trovas ĉe Mateo en du formoj. En rektaj eldiroj kiel *„Sed celu unue lian regnon kaj lian justecon, kaj ĉio tio estos aldonita al vi"* (Mat 6,33): La fakto, ke la Regno havas preferan lokon kaj estas kunliga kun klopodo pri justeco, klare fluas el ĝia pozicio de la unua kaj lasta rekompenco en la feliĉoj (Mat 5,3.10) La versiklo 10 estas tre elokventa: *„feliĉaj estas tiuj, kiuj estas persekutitaj pro justeco, ĉar ilia estas la regno de la ĉielo."* La dua formo de kunligo de la Regno kaj etiko troviĝas en la paraboloj. Sep parabolojn ni trovas en la 13-a ĉapitro, kiuj faras centron de la evangelio. Tri paraboloj estas en Mateo 21,28–22,14, sed la plej grava parabolo pri la Regno kaj ĝia kunligo kun etiko prezentas la belegan kaj influan scenon de la lasta tribunalo en Mateo 25,31–46, en la parabolo pri la ŝafoj kaj kaproj.

*„Tiam diros la Reĝo al tiuj, kiuj staras dekstre de li: Venu, vi benataj de mia Patro heredu la regnon preparitan por vi de post la komenco de la mondo; ĉar mi malsatis, kaj vi donis al mi manĝi; mi soifis, kaj vi donis al mi trinki; mi estis fremda, kaj vi gastigis min; nuda, kaj vi vestis min; mi malsanis, kaj vi vizitis min; mi estis en malliberejo, kaj vi venis al mi."* (Mat 25,34-36)

Ni bone konas la respondon de la benatoj kaj ankaŭ de tiuj, kiuj staris maldekstre. Sed tio ne signifas, ke Mateo estus leĝisto aŭ ke mankus al li kompato al la pekuloj. Unue li volas averti kristanojn kontraŭ memkontento kaj volas ilin kuraĝigi en la vivo de kredo. El tio oni deduktas sian estontan sorton en la Regno.

La dua memstara trajto de la Regno laŭ Mateo estas lia certeco pri la kunligo inter Dia Regno (kiu alvenos en la estonteco) kaj la nun funkcianta Eklezio. Vere la grupo de disĉiploj, kiujn kolektis Jesuo dum sia surtera funkciado, starigis post lia morto la Eklezion. Tradicie oni diras, ke la Eklezio naskiĝis de la trapikita kokso de Kristo, aŭ alternative, ke ĝi naskiĝis dum Pentekosto. Petro kaj Paŭlo staras post la Pasko kiel grandaj fondintoj de lokaj eklezioj (Gal 2,7.8). Je unua rigardo ŝajnas, ke la Agoj kaj Paŭlo malmulte parolas pri la Regno, sed multe pri la Eklezio. El tio estas la demando, kia estas la rilato inter la Regno kaj la Eklezio? Parte respondas al ni la konata versiklo *„Vi estas Petro…"* en la Matea evangelio (Mat 16,19).

*„Kaj mi diras al Vi, ke Vi estas Petro, kaj sur ĉi tiu roko mi konstruos mian eklezion; kaj pordegoj de Hades ne superfortos ĝin. Mi donos al vi la ŝlosilojn de la regno de la ĉielo; kaj kion ajn vi ligos sur la tero, tio estos ligita en la ĉielo; kaj kion ajn vi malligos sur la tero, tio estos malligita en la ĉielo" (Mat 16,18–19)*

Tiuj vortoj konfirmas, ke ekzistas kunligo inter la Eklezio kaj la Regno, ke ekleziaj reprezentantoj havas ŝlosilojn de la Regno, kaj implicite ke nia rilato al ili havas ian influon je nia eterna sorto. La Eklezio ne estas la sama kiel la Regno aŭ la Ĉielo, ĝi estas nur la vojo al ili, kunveno de tiuj, kiuj donas al la Regno sian esperon.

### Pri la evanqelisto Luko ni jam ne parolu multe

En Luk 4,16–30 la evangelisto komencas sian resumon pri la publika funkciado de

Jesuo per la grandioza sceno, per la unua prediko de Jesuo en la sinagogo en Nazareto. Jesuo plenumas profetdiron de Jesaja pri la liberigo kaj li avizas savon de paganaj nacioj. Sed tie ĉi ankaŭ kaŝiĝas unu problemo. Tiu ĉi sceno de Luko respondas al Marko 1,15 kaj Mateo 4,17, pri kiuj ni jam parolis.Tie ĉi mankas la avizo pri proksima alveno de la Regno. Tie ĉi ni trovas nur silenton pri tiu ĉi punkto. La Regnon kompensas la citaĵo el Jesaja 61,1.2; 58,6:

*„La spirito de la Eternulo estas sur mi, ĉar li min sanktoleis por bonanonci al malriĉuloj; Li sendis min por anonci liberecon al kaptitoj kaj vidpovon al blinduloj, por meti la vunditojn en liberecon, por proklami favorjaron de la Eternulo.”* (Luk 4,18–19)

> Tiuj vortoj konfirmas, ke ekzistas kunligo inter la Eklezio kaj la Regno, ke ekleziaj reprezentantoj havas ŝlosilojn de la Regno, kaj implicite ke nia rilato al ili havas ian influon je nia eterna sorto.

Ni ne povas voli pli bonan priskribon, kion signifas la alveno de la Dia Regno sur la teron. Tio ESTAS la Regno. Do, por kio Luko pri la Regno ne parolas? Ne eblas dubi, ke Luko firme kredis: Kie estas Jesuo, tie estas proksime la Regno. La citaĵo de la Malnova Testamento en la loko, kie aliaj evangelistoj parolas pri la Dia Regno, povas esti ankoraŭ pli bona, pli viva kaj pli utila. Li esprimis centran temon de predikoj de Jesuo kaj de lia espero en terminoj, kiuj estis la propraj de Jesuo. Ankaŭ aliaj homoj parolis pri la Regno, sed neniu el ili koncentris ĉion tiel firme, kiel Jesuo. Sed Luko tie ĉi plisimpligas la unuecon de Jesuo kaj la plenecon de liaj eskatologiaj atendoj. Lia teksto estas politike pli riĉa, sed teologie pli malriĉa. Plej bone estus montri, kiel la teksto de Jesaja prilumas la esperon je la Regno. Eble li tion pensas, kiam en la sekva frazo li diras: *„Hodiaŭ tiu skribo plenumiĝas en viaj oreloj.”* (Luk 4,21)

La dua kazo estas en Luko 17,lb: *„Ĉar jen la regno de Dio estas inter vi”*. Tie ĉi estas klara ideo, ke la Dia Regno ĉeestas en la sava potenco de Jesuo kaj en la verko de resanigo. Tio signifas, ke nuntempa trarompaĵo de la Regno estas nur komenco. Kaj komenco devas esti ankaŭ finita. Tiuj, kiuj povas rekoni nuntempe la Regnon en la laboro de Jesuo, estas invitataj persone labori en ĝia preparo.

Kiam ni volas difini la nedifineblan, ni povas diri, ke la Dia Regno estas estonteca apokalipsa Dia dono, kiu ne estas rekte konstruita per homoj, sed ĝi estas donata kiel respondo al esperplena preĝo, al longa, persista kaj elĉerpa batalo. Ĝi estas fina Dia triumfo, per kiu Dio vizitas kaj savas siajn homojn. Ĝi estas logika fino de bena savo, tio signifas la plenumon de ĉiuj promesoj, kiuj fariĝis realeco per tiu ĉi Dia ago.

(Laŭ la libro de Benedict T. Viviano, *„La Dia regno en la historio”,* eldonis ĉeĥa eldonejo Vyšehrad 2008)

# Raporto pri la KELI kongreso de 28-07-08 ĝis 04-08-08

Raportis Vera TUINDER-DEKKER, NL




1

Helpe de kelkaj 'anĝeloj' laŭlonge de la vojo, Jacques kaj mi alvenas la 28an de julio en hotelon Esperanto [1] en Pribylina (Slovakio). Kia surprizo! Post gaja kaj varma revidiĝo, Pavel montras nian ĉambron por la kongresa semajno. Kun niaj najbaroj Anna kaj Mats ni havas komunajn duŝon kaj necesejon. Dum la posttagmezo la kongresanoj alvenas; ĝoje ni bonvenigas novajn kaj malnovajn geamikojn.

29-julio

La matenpreĝon prizorgas Anna kaj Mats Landfors.

La oficiala inaŭguro okazas en la Luterana preĝejo de Pribylina [2]. La pastorino rakontas pri la historio de ĉi tiu preĝejo kaj poste frato Klimeš gvidas la diservon.

Posttagmeze ni vizitas Naturmuzeon en la najbareco [3]. Oni rekonstruis en tiu loko vilaĝon kiel ĝi aspektis en la mezepoko. Multaj domoj estis transportitaj el 13 vilaĝoj, kiuj malaperis sub la akvo de nove konstruita valbaraĵo Liptovská Mara, kun la elektriga akvocentralo. Loka raraĵo estas ŝtonaj konstruaĵoj, kiuj estis same surloke denove konstruitaj kun la partoj de la muroj kun la originalaj sgrafitoj. Tiel ili ricevis novan vivon.

Sekvas estrarkunsido. Vespere la interkonan kunvenon gvidas originale, kvizmaniere, Samuel Gaillard. Vesperpreĝas kun ni Éva Farkas-Tatar.





2



4

30-julio
La matenpreĝon gvidas Andreo Sandoz [4]. Siegfried Krüger kaj Karl Heinz Schaeffer responsas pri la komuna kantado. Se Adolf povus nin aŭskulti, li foje ŝtopus siajn orelojn pro niaj malbelaj sonoj!

Eva lekcias pri Dia Regno, en kiu estas harmonio kaj streĉiĝo, la du kontraŭdiroj: Dio ne estas justa sed kompatema. – ... tamen mi amas vin.



5

Pavel [5] memoras pri Pavel Tichý, kiu post longa malsano, neatendite mortis. Poste li laŭtlegas la prelegon, kiun Pavel Tichý preparis por ni.

De la kvara ĝis la kvina horo Samuel kaj Vera aktivigis pere de jogo kaj gimnastiko la tro longe sidintajn homojn.

Siegfried parolas pri Jelly Koopmans kaj ŝia noveldonita preĝlibreto: *Preĝoj por ĉiu tago*. Li aldonas ke tiuj kiuj ĝin aĉetas rekte kontribuas al Fondaĵo Evidente.

Bengt Olof instrukcias nin pri nia organo Dia Regno. Pere de lia eksplikо ni spertas lian laboron. Kiel multflanka ĝi estas! Konklude, sendu artikolojn, diversajn, por ke la leganto kun ĝojo legu ĝin!

Agnes, kun multaj belaj fotoj, prelegas pri la pasintjara kongreso en Pelplin. Dum la vespero Pavel invitas nin al kvizo. La vesperpreĝon prizorgas Jacques Tuinder.

31-julio
La matenpreĝon gvidas Pavel Klimeš.

Tuttaga ekskurso. Aŭtobuse ni veturas al Štrbské Pleso en la montaro Altaj Tatroj. Tie ni ĉirkaŭpromenas belan lagon [6,7]. La suno brilas kaj la kongresa foto estas farata [14]. En la fono nin ravas la blua akvo de la kvieta lago. En la urbo situas malnova amfiteatro kie ni manĝas la enhavon de niaj kunprenitaj lunĉpaketoj. Nia sekvanta halto estas en la urbo Kežmarok. Ĉi tie ni vizitas tri preĝejojn. Komencas pluvi kaj ni kuras kafejen kaj sub granda veltolo ni trinkas tason da kafo [8]. Ni



6, 7





8

reiros 'hejmen' tra Poprad, ''ĝuante'' novan parton de la aŭtoŝoseo !

Vespere Arne Lundkvist prelegas kaj poste Wil van Ganswijk aranĝas programon kun ludŝatantoj tiel instruante nian karan lingvon. La vesperpreĝon gvidas Siegfried Krüger.

01-aŭgusto
Enkondukas nin en la matenpreĝon Britta Rehm. Hodiaŭ ni jam pli bele komune kantas sub la gvido de Karl Heinz kaj Siegfried.

Sekvas la jarkunveno, la parlamento de KELI [9]. Ni inter alie priparolas la planon pri komuna kongreso venontjare en Vroclavo. La KELI kongreson de 2010 organizos niaj hungaraj membroj. Multfoje mi aŭdas la vorton 'Vikipedia', reta enciklopedio kun multaj informoj en Esperanto.

Posttagmeze: estrarkunveno. Wil van Ganswijk prelegas pri ikonoj. Unu horo de korpo-ekzercado fare de Samuel kaj Vera.

Pavel invitis al nia kongreso grupon da muzikistoj el Slovakio [10], kiuj ofte koncertas okaze de diversaj E-renkontiĝoj. La gvidanto nomiĝas Petr Sarnovsky, li ludas la violonon, gaja virino lerte ludas akordeonon kaj juna simpatia viro ludas kontrabason. Ili ĝojige muzikas kaj kantas por ni. Malgranda Andre [11], la eta filo de Ágnes kaj Bengt, tiel ŝatas la muzikon ke li elegante dancas por ni.

La interpretisto Stano Marček, rekte



10



11

veninte el junularkongreso en Szombathely, pro malfacilaĵoj survoje malfruiĝis. Tamen la muzikistoj kaj ni bone komprenas nin unu la alian pere de la muziko. Sukcesan vesperprogramon fermas per preĝado Priscille kaj Samuel Gaillard.

02-aŭgusto
La matenpreĝon prizorgas Ágnes Ráczkevy. Komuna kantado iom post iom pliboniĝas.

Stano Marček prelegas [12] unue pri UEA centjara kaj poste pri la 'rekta metodo' de instruado kiun li praktikas.



9


12

Li diras : ''Oni instruu esperanton tiel, kiel la patrino instruas al sia infano la propran lingvon''.

Posttagmeze sekvis la duontaga ekskurso. Ni busas al la grotoj de Demänovska. Impresplena! Poste ni vizitis lignan preĝejon en Svätý Kříž sude de Liptovský Mikuláš, plej granda en meza Eŭropo (loko por 6 mil personoj). Libera vespero por prepari la adiaŭan vesperon. La vesperpreĝon ni faras kun Maria Lászlo kaj Helga.

03-aŭgusto
Post la matenmanĝo ni iras al la vilaĝa preĝejo. Ni havas liturgion kun sankta manĝo. Zlatica Adameova, la loka pastorino, invitas nin ĉeesti la slovakan diservon kaj tuj poste iri al la paroĥa domo por ĝui kafon aŭ teon kun kukoj kaj sendviĉetoj [13]. Leviĝas multaj demandoj al kiuj la pastrino respondas. Estas gaja kunveno.

Posttagmeze Bengt Olof lanĉas programon pri diservoj. Li paroligas nin pri


13

tio, kio plej multe trafas nin dum nia diservo laŭ nia tradicio.

Ankoraŭfoje oni povas sin distri per jogo kaj gimnastiko. Vera instruas la malstreĉigajn ekzercojn kaj Samuel lasas la partoprenantojn ŝviti!

Jam venas la adiaŭa vespero kiun lerte gvidas Samuel. Ni kantas, ridas kaj amuzas nin. La prezidanto dankas la LKK kaj konkrete substrekas la dankon de la kongreso per donaco. La vesperpreĝon prizorgas Philippe Cousson.

04-aŭgusto
En la lasta kongresmateno la adiaŭa horo estas same kortuŝa kiel neevitebla. Resume, ni havis bonetosan kongreson!

Fotis: Ágnes Ráczkevy-Eötvös, Václav Pospíšil, Karl-Heinz Schaeffer, Bengt Olof Åradsson, Erzsebet Párkányiné Kaszab


14



En la akceptejo



IrénBagi, Éva Farkas



Pavel Polnický kaj IrénBagi

# Kongresanoj



La paro Klimeŝ



En la naturmuzeo, Pribylina



Priscille Gaillard, Szubryczyńska, Grażyna

# KELI dum la UK en Rotterdamo

Raportis Els van Dijk-Kuperus, NL

## Ekumena diservo dum la Universala kongreso



De maldekstre P. KNAUER kaj G. BERVELING

Dimanĉon, la 20-an de julio, partoprenis proksimume 200 kongresanoj de la universala kongreso, la ekumenan diservon. Gvidis ĝin pastoro Gerrit BERVELING kaj profesoro Peter KNAUER SJ (profesoro de la Jezuita Ordo). La orgenisto de la preĝejo akompanis la kantadon. La diservo okazis en la Remonstranta preĝejo de Roterdamo, la Arminius-preĝejo. Ĝi estis dezajnita de du remonstrantaj arkitektoj kaj finkonstruita en 1897.

La gvidilo por la liturgio estis "ADORU". La legaĵoj el la Biblio estis: Neĥemia 8,1-12; Korintanoj 5,17-21; Johano 3,16-21. Post la diservo okazis monkolekto por kovri la kostojn de la diservo kaj por la agado E-vid-E-nt-E de la nederlandano Jacques TUINDER. La kolektita monsumo estis 572,55 Eŭro. La diservo estas ne-malhavebla programero de la kongreso.

## Fakkunsido de KELI kaj IKUE

En la salono Wensing de la kongresejo Beurs-WTC (komerca centro) okazis la fakkunsido de KELI kaj IKUE. Ĉeestis 48 kongresanoj je mardo-mateno, la 22-an de julio. Els van Dijk malfermis la kunvenon kaj gvidis. Marija Belošević reprezentis IKUE. La kongresanoj estis informitaj pri: la represo de la Preĝlibro de Jelly Koopmans, la ekumena kongreso de 2009 kaj Gerrit Berveling prelegis pri siaj tradukoj. Senpagaj "Dia-j Regno-j", informiloj pri KELI kaj aliĝiloj por la ekumena kongreso estis je dispono. ꕤ





# Dia Regno akompanas kunvojaĝantojn al Dia Regno

Pavel TICHÝ Ĉeĥio

Kun bedaŭro ni eksciis ke nia kara frato Pavel TICHÝ mortis mallonge antaŭ la KELI-kongreso (vidu la nekrologon sur paĝo 95). Li preparis la jenan prelegon, kiun Pavel POLNICKÝ laŭtlegis por la kongresanoj. /Redaktoro

Centjara historio de nia gazeto enhavas 869 numerojn. Parton de tiu historio povis sperti ankaŭ mi. Kun unuaj numeroj de nia revuo mi konatiĝis en sesdekaj jaroj de pasinta jarcento. Post la Evangelia diservo okazinta en la kadro de 51-a UK en Budapesto en la jaro 1966 mi dank´ al Adopta kaso povis regule ricevi Dia Regnon. Per kelkaj artikoloj mi dum tia longa periodo kontribuis al la enhavo de la gazeto, sed neniam mi estis regula skribanto.

Ne estas facile el tiu periodo memori tion plej gravan kaj interesan. La enhavo estis sufiĉe varia, kelkaj numeroj plene altiris mian intereson, aliaj post tralego aŭ trafoliumado restis sen reago.

Jarkolekto 1967 alportis serion de artikoloj Nia laboro ne estas vana en la Sinjoro el la plumo de tiama prezidanto de KELI A. Burkhardt. Mi ne estas certa ĉu iam aperis tia unika resumo de eblecoj kaj rimedoj de KELI agado. Kiam ni staris antaŭ la fakto, ke niaj vicoj malgrandiĝas kaj maljuniĝas mi kelkfoje revenis al la serio.

Du komunaj numeroj de Dia Regno kaj Espero Katolika el jaroj 1968-69 aperintaj post la komuna kongreso en Limburg celis prezenti diversecon de kristana vivo. Tio estis simpatia provo eliri el sia propra medio kaj aŭskulti al tiuj, kiuj al la sama celo iras ne sur tute identaj vojoj sed kun kiuj ni povas sidi ĉe komuna tablo. Ni ne povis esprimi nian ĉagrenon kaj trompiĝon kiam nur unu monaton antaŭ inaŭguro de la dua komuna kongreso de kristanaj esperantistoj en Brno en la jaro 1970 nia ministerio por internaj aferoj rifuzis doni sian aprobon por la organizo de la kongreso. Ĝi promesis esti plej vizitinta kongreso en la IKUE kaj KELI historio. Feliĉe la preparitaj prelegoj pri Jan Amos Komenský povis aperi en komuna numero de DR kaj Espero Katolika.

En la jaro 1974 Birgitta Ahlrén esperantigis kelkajn poemojn de juna sveda poetino Ylva Eggehorn kaj publikigis ilin en Dia Regno. Ili vekis ne nur mian intereson, sed ankaŭ junulara rondo de nia Eklezio Fratara en Brno volis konatiĝi kun ili. Tiujn, kiuj estis publikigataj en Dia Regno mi tradukis en ĉeĥan lingvon kaj disponigis al tiu

rondo. Ankaŭ artikoloj pri la nova vekiĝo kaj Nova komuneco, en kiuj aktivis familio Ahlrén estis por la junularo en Brno tiel impresaj, ke mi tradukis ankaŭ ilin.

Ĉiam mi dankeme legis nekrologojn, precipe de tiuj gefratoj, kiujn mi konis aŭ kiujn mi renkontis. Foriro de iu proksima, atingo de la dua bordo, kie la morto jam ne ekzistas, ne plu ekzistas funebro nek plorado nek doloro ĉiam gvidas nin al pripenso de lastaj aferoj de homo. Multaj gefratoj vive atestis pri eterna Dia mizerikordo kaj ilia humila konfeso. Estas jam granda vico de tiuj, kiuj jam ne plu estas inter ni. Mi mencius nur kelkajn el ili: Ivar E. Karlsson, Ingalil Drobny, F. D. Murphy, Henry Lundin, geedzoj Sandgren, Tini Putto, A. Burkhardt, Anna-Lisa Ahlrén.

Iu diris, ke Jesuo estas fenestro tra kiu ni vidas Diajn farojn. Tion mi volas deziri al pluaj numeroj de nia gazeto, ke ni renkontiĝu en ili kun Diaj faroj.

Kiel ĉarmaj estas sur la montoj la piedoj de anoncanto, kiu proklamas pacon, anoncas bonon, sciigas pri helpo, diras al Cion: Reĝas via Dio (Jes. 52,7).

# Ĉu ekumenismo minacas la fidelecon al nia Eklezio?

Tradukita de Vitor LUIZ, BR

La ekumenisma afero havas fortan alvokon en tiu nia mondo dividita, konkurema, perforta. Ĉiam estas tre simpatie paroli pri paco, reamikiĝo, frata renkontiĝo, kunpartopreno je la konstruado de valoroj de la Regno. Malgraŭ ĉia pozitiva forto de tiu propono, kelkfoje ŝvebas en la koroj kaj en la mensoj iom da timoj, iom da hezitoj, iom da demandoj. Estas homoj tre sinceraj kaj bon-intencaj, kiuj demandas al si: Ĉu mi ja povas akcepti la alian eklezion kiel parto de mia kredo-familio? Farante tion, ĉu mi ne malgrandigos aŭ relativigos mian propran eklezion? Ĉu mi ne riskas miksi ĉion kaj perdi la identecon? Ĉu mi ne iĝos malpli katolika, aŭ malpli presbiteriana, ortodoksa, anglikana, luterana, baptista, metodista ..., se mi kapablos valorigi la aliajn ekleziojn kaj proksimiĝi al ili?

Se ekumenismo estus miksado, tiuj kaj aliaj timoj estus tre pravaj kaj kompreneblaj. Se ni miksus, ni kreadus plian manieron esti eklezio anstataŭ marŝi al la unueco. Tio estus plia divido. Ne estas tio, kion oni volas. Ververe, la unua kondiĉo por ke iu estu utila al la ekumena laboro estas la

fortikeco de lia sindevigo al sia propra eklezio, la firmeco de sia identeco en sia konfesio. La homo eniras la ekumenan dialogon kiel reprezentanto de sia eklezio. Estas espereble, ke per la fideleco de tiu frat(in)o la aliaj povu havi bonan bildon de tiu eklezio. Luterano malkontenta pri sia eklezio, ekzemple, estus malbone kvalifikita por helpi katolikon, anglikanon valorigi la luteranan eklezion. La samo taŭgas por iu ajn alia konfesio. La diskonigo de ĉio plej bona, kion ĉiu eklezio havas, estas parto de la celo de la ekumena laboro. Nur sukcesas montri la plej bonon de la eklezio tiu, kiu sentas sin bone, feliĉa kun ĝi. Tiu "montri la plej bonon" ne estas la samo ol reklami por konvinki la alian. Simple signifas ĝoje interŝanĝi ĉion bonan, kion la kristana propono sukcesas krei.

Niaj eklezioj ne estas la finaj celoj de nia kredo. Se ili estus, ili okupus la lokon de Dio - kaj tio nomiĝas idolanismo. Ili estas iloj. Sed ili estas iloj karaj, amataj, kiuj, antaŭ ol konstrui ion bonan en la mondo, kontribuas por konstrui nian propran personecon. Pro tio, kutime ni ne diras: mi partoprenas tiun eklezion. Ni diras: *mi estas* metodisto, *mi estas* anglikano, *mi estas* katoliko, *mi estas* baptisto... La eklezio estas parto de ni – kaj tiel ja devas esti. Kiu nenion havas por diri, tiu ne kontribuas al la dialogo. Se ni malfortigas la ekleziojn, ni damaĝos la Kristanismon mem. Ni ne volas, ke la eklezioj iĝu sendistingaj, egalaj, fandiĝu en ia senforma aro... Unueco ne estas unuformeco. La unueco, kiun ni volas estas la diverseco repaciĝinta. Estas la malsamuloj estimantaj sin bone, sin respektantaj, kunpartoprenantaj, reciproke ĝojiĝantaj pro ĉio bona, kion ili sukcesas realigi.

Kelkfoje iu demandas: Ĉu eklezio, kiu havas ekumenan laboron povas daŭre alvoki homojn al sia komunumo, prezentante sin kiel vojo al tiuj, kiuj volas esti kristanoj (alivorte: povas esti misiista)? Sen konkuri kun aliaj eklezioj, ĉiu eklezio ne nur povas sed ankaŭ havas la mision kreski tiel multe, kiel sia kreskiĝo estas ankaŭ la kreskiĝo de la grego de Jesuo. La ekumena laboro ne estas barilo. Se ĝi estas parto de la identeco de la eklezio mem, ĝi povas esti eĉ plia logaĵo. La eklezio havos plian bonan aferon por diri pri si mem: ĉi tie, respekti kaj valorigi la aliajn kristanojn estas parto de nia maniero vivi la Evangelion.

Ne estas espereble, ke iu partoprenu la ekumenan kunvivon kaj revenu hejmen malpli katoliko, malpli baptisto, malpli ortodoksulo ... Oni ja esperas, ke tiu homo – fortika je sia religia identeco – ŝatu esti ambasadoro de la paco kaj de la dialogo. Ambasadoro reprezentas ĉiam la landon, kiu sendis lin: li kontribuas por ke la aliaj ŝatu lian landon kaj revenas hejmen kun kondiĉoj helpi siajn samlandanojn vidi je simpatio la lokon, kie li estis bone akceptita.

[origine verkita en la portugala de Therezinha Motta Lima da Cruz, ano de CONIC – Nacia Konsilo de Kristanaj Eklezioj, en Brazilo] ꩜

# Neordinara travivaĵo

Rakontas Britta REHM, SE

Foje dum la militjaroj mi vizitis vintre miajn geonklojn en la loko Hällingsjö ĉirkaŭ kvardek kilometrojn oriente de Gotenburgo. Estis la festo de *Tri Reĝoj*. Konekse kun tio mi volas mencii, ke mi loĝis ĉe ili ankaŭ kiel evakuito kelktempe dum la okupado de niaj najbaraj landoj, Danlando kaj Norvegio aprile 1940. Mi ne plu memoras, kiel longe mi restis tie, sed sufiĉe longe por vizitadi la lokan lernejon. Krom tio mi travivis ses mirindajn somerojn dum la jaroj 1940–1945 tie ĉe miaj parencoj.


Jen denove al la tago de Tri Reĝoj, plej kredeble tio estis en la jaro 1941. (Ne tro gravas laŭ mi; mi ne plu havas iun por demandi). En tiu regiono oni kutimis celebri frumatenan diservon tiun tagon je la sepa horo. Sekve mi promenis kun miaj gastigantoj kaj aliaj ĉirkaŭ du kilometrojn al la preĝejo. Estis por mi, dekjara gotenburga knabino, tute neordinara travivaĵo iri en la nigra frosta mateno. Tamen la dometoj kaj biendomoj havis lumigitajn fenestrojn, kiuj lumigis la neĝon ĉirkaŭe.

Estis multe da homoj en la preĝeja varmo kaj lumo. Mi nek memoras, ĉu troviĝis kristnaska arbo tiutempe en la absido, nek la enhavon de la prediko. Kontraŭe mi bone memoras, kio okazis je la fino de la diservo. La celo de la monkolektado tiutage ĉiam estas por eksterlanda misia laboro. Tie oni devis meti la monon en la baptujon. Apude staris la paroĥestro kaj li fikse rigardis, kiom multe oni metis tien! Almenaŭ mi tuj reagis pri tio kaj mi ne ŝatis lian manieron tiurilate, eĉ tiel multe, ke mi daŭre – post tiom da jaroj – bone memoras tion.

Kiom multe oni donas, devas esti anonime, almenaŭ pli ol tio, kio okazis tiam en tiu preĝejo. Krome la paroĥestro poste rimarkigis mian onklinon pri mia nekonvena vestmaniero, "ne taŭga en la preĝejo" – laŭ li. Mi ja portis longan pantalonon kiel knabo! Mia patrino volis vesti min tiel, por ke mi ne malvarmumu en tiu neordinare malvarma vintrovetero – mi ja estis infano!

Tiu paroĥestro estis konata en la regiono kiel malvastspirita "schartaŭano"*.

Spite de la malagrablaĵoj ĉi-supren, la tago estas bela memoraĵo de mia infaneco.



* Henric SCHARTAU, 1757 – 1825, estas konata pro siaj striktaj kaj nekompromisaj predikoj. Liaj ideoj forte influis junajn pastorojn en precipe la suda kaj okcidenta regionoj de Svedio. /Redaktoro

# Duakanonaj libroj, La

Recenzas Leif NORDENSTORM, SE

**Duakanonaj libroj, La**. Volumo 3: Libroj de la Ortodoksiaj Eklezioj. Tradukis G. Berveling. Religio. Voĉoj Kristanaj. Zwolle. 2008. 233 paĝoj. Prezo: 19.50 eŭroj ĉe UEA.

En ”Etimologia Vortaro de Esperanto” de Ebbe Vilborg ni povas legi ke la vorto ”biblio” devenas de greka vorto ”biblía” kun la signifo ”libroj (sanktaj)” – plurala formo. Ni modernaj homoj kutimas paroli singulare pri unu biblio – unu libro, kaj tial ofte forgesas ke fakte temas pri tuta biblioteko.

En sinagogo tamen troviĝas unu *aron hakodeŝ*, ŝranko en kiu oni konservas la torarulaĵojn. En tiu ŝranko oni ja ankaŭ povas konservi rulaĵojn de aliaj sanktaj skribaĵoj. Tio ankaŭ okazis dum la jarcentoj antaŭ kaj post Kristo. Torarulaĵoj estis en ĉiu sinagogo. Krom tio oni havis ankaŭ profetajn kaj aliajn librojn, sed ne la samajn en ĉiu sinagogo. Inter alie pro la ekesto de kristanaj skribaĵoj fine de la 1-a jarcento judaj rabetoj en Palestino fiksis la kanonon de la Hebrea biblio.

Kristanoj plu uzadis Septuaginton, tradukon de hebreaj skribaĵoj faritan en Aleksandrio ĉirkaŭ la jaro 200 a.K. En traduko estis ankaŭ kelkaj libroj, kiuj ne estis akceptitaj en la Hebrea biblio. Al Septuaginto la kristanoj aldonis la Novan Testamenton. Kiel konate post la reformacio kalvinanoj ne plu akceptis tiujn malnovtestamentajn librojn, kiuj ne apartenas al la Hebrea biblia kanono. Tiel kelkaj libroj forfalis el la kalvinana biblio: Tobit, Judit, Aldonoj al Ester, 1 Makabeoj, 2 Makabeoj, La saĝeco de Salomono, La saĝeco de Jesuo, filo de Siraĥ, Baruĥ, Letero de Jeremia kaj Aldonoj al Daniel. Tiuj libroj tamen ĉiam estis parto de katolika kaj almenaŭ formale al luterana biblioj. Ekde 2006 ili aperas en la Biblio en Esperanto, tradukitaj de Gerrit Berveling kaj aperintaj kiel volumoj 1 kaj 2 en Voĉoj Kristanaj.

Malmultaj okcidentaj kristanoj tamen observis ke ekzistas ankaŭ alia konfuzo pri kanoneco de bibliaj libroj. Ortodoksaj eklezioj – inter si iom malsame – akceptas ankoraŭ kelkajn librojn, kiuj laŭtempe apartenas al la periodo inter Torao kaj Nova Testamento.

- *1 Ezra* paralele al aliaj bibliaj libroj rakontas pri la ekzilo, la reiro kaj la rekonstruo de la templo.
- *4 Ezra* estas kristana libro pri la eklezio kiel nova Izrael kaj pri apokalipso de Ezra.
- *3 Makabeoj* rakontas pri judoj en Aleksandrio dum la Ptolemea dinastio kaj pri provoj de Ptolemeo eniri la sanktejon de Jerusalemo.
- *4 Makabeoj* filozofie traktas la racion.

En la libro aperas ankaŭ *Psalmo 151* kaj *Preĝo de Manase, Matena himno, Psalmoj de Salomono* kaj *La Letero al la Laodiceanoj*.


Ni menciu ankaŭ ke eĉ post tiu ĉi eldono restas la Etiopia Henoĥ por ke la Biblio estu tute kompleta.

Gerrit Berveling faris grandan servon al la esperantistaro tradukante la duakanonajn librojn. Mi ne estas kompetenta juĝi pri ĉiuj detaloj de la traduko, kiu tamen ŝajnas al mi fidinda. La esperanta lingvaĵo estas bona. Aperas ankaŭ multaj notoj post la traduko. La enkondukoj al ĉiu libro estas gravaj por la kompreno.

**Mi starigu demandon:** Ĉu kristano bezonas tiujn ĉi librojn por esti kristano? Certe ne nepre bezonas. Dum preskaŭ dumil jaroj kristanoj entute ne povis legi kaj preskaŭ neniu posedis biblion kaj kristanismo tamen floris en multaj landoj. Ni ĝoju ke en nia tempo ni povas legi la biblion, sed ni ankaŭ devas konfesi ke la limoj pri kio fakte estas la biblio ne estas klaraj. (Parenteze mi povas mencii ke Preĝo de Manase apartenas al la kanono ne nur de la ortodoksaj eklezioj sed ankaŭ al la tradicia kanono de la Sveda luterana eklezio.) Do, la limoj de la kristana biblio ne estas klaraj, sed ĝia centro estas des pli klara: Jesuo Kristo. Pri ĉio ĉi atestas ankaŭ Sankta Luko: *”Ĉar multaj jam entreprenis aranĝi historion pri la faktoj…”*

La Duakanonajn Librojn, volumon 3 neniu kristano bezonas por resti kristano, sed ĉiu kiu interesiĝas pri biblio kaj volas pliprofundiĝi en la pensmaniero de la jarcentoj antaŭ Kristo kaj dum la unua jarcento de kristanismo certe povas ĝui la legadon.

—




Okaze de la ĉi-jara Univerala Kongreso kaj Internacia Infana Kongreseto en Roterdamo/Oostvoorne mi sukcesis aperigi mian Esperantan tradukon de nederlanda historia romano pri Florenco (taŭga por kaj infanoj kaj plenkreskuloj!), sub la nomo “Paolo, la lernanto de Leonardo da Vinĉi”.

Eldonis ĝin KELI-ano Petro Chrdle de eldonejo KAVA-PECH en Ĉeĥio. KELI-anoj povos mendi ekzempleron ĉe mi per sendo de letero al benata@zonnet.nl (aŭ al mia poŝtadreso, vidu sube). La prezo estas 9,90 € (sen sendokostoj). Ankaŭ eblas mendi ekzempleron ĉe KAVA-PECH aŭ UEA.

Benata Hengstmengel-Koopmans
Vendelstraat 10; NL-2316 XP Leiden


# Informejoj

Gerrit BERVELING gajnis la duan premion kadre de la "Belartaj Konkursoj" de la universala kongreso en la branĉo "Poemo". Li deklamis sian poemon "Mortis la Dioj". Ni multe gratulas al lia sukceso.



Els van Dijk-Kuperus

---



## Karl Buremo
## 23.4.1913 – 27.8.2008


Karl Buremo naskiĝis 1913 en la vilaĝo Bureå. Li mortis 95-jara la 27-an de aŭgusto 2008. Li vizitadis la teknikan lernejon de Hässleholm kaj perfektigis sin pere de korespondaj kursoj. Lia unua okupo estis kiel inĝeniero ĉe la feruzino Avesta Järnverk kaj poste deĵoris en la uzino Åkers Styckebruk. En Nacka li laboris ĉe Alfa Laval ekde 1947 ĝis 1962, kiam la familio translokiĝis al Jönköping. Tie li deĵoris ĉe Svenska Gjuteriföreningen ĝis sia pensiiĝo 1978. Li ankaŭ praktikis en Bruselo dum sia tempo ĉe Alfa Laval.

En Bureå Karl partoprenis en ĝia eklezia juna kaj junularorganizo. En sia junaĝo li studis Eperanton. Estis en la jaro 1947, kiam Karl kaj Stina membriĝis en la Sveda Esperantofederacio kaj la kristana asocio KELI, en kies internacia estraro li estis membro dum du jaroj. Li partoprenis en multaj UEA kaj KELI-kongresoj kaj kongresoj ekumenaj. Por IBRA radio li surbendigis plurajn predikojn, tiel same por la kristana radiostacio HCJB en Ekvadoro. Ekde 1962 Karl Buremo estis membro de la eklezia komunumo de la Ansgara preĝejo (Sveda Misia Federacio)


Li estas karmemore funebrata de Stina kaj la infanoj Lennart kaj Ingrid. La Sveda Esperantofederacio, KELI kaj UEA perdis fidelan membron. La komunumo de la Ansgara preĝejo sentos la foreston de bona ekleziano.

La funebra diservo okazos la 26-an de septembro en la preĝejo Ekhagskyrkan. Oficianto estos pastro Andreas Sköldmark de Ansgarikyrkan.

Arne Lundkvist



# S-ro Pavel Tichý,
## Ĉeĥio
1938-06-04 - 2008-07-07



Ni atendis denovan renkontiĝon, Pavel kaj mi, dum la KELI-kongreso en Pribylina, sed Dio volis alie. Antaŭ du jaroj trafis lin kancero kaj li poste trapasis pluraj-n kuracadajn periodojn en malsanulejo.

Je la pasinta jarfino li sentis sin tiom bone ke li aliĝis al la ĉijara kongreso, sed ses semajnojn antaŭe lia sanstato grave malboniĝis kaj plia kuracado ne eblis.

Tiel finiĝis kvardekjara amikeco. Ni renkontiĝis ne nur dum kongresoj, sed ankaŭ private. Li estis granda naturamiko kaj pere de li specife mia edzino Anna-Lisa kaj filino Birgitta konatiĝis kun vidindaj regionoj de lia hejmlando, la tiama ĈSSR, i.a. la Altaj Tatroj, nia ĉijara Slovaka kongresregiono. Plurfoje li vizitis nin en Stokholmo, unufoje kun sia tuta familio, edzino Růžena kaj gefiloj Lenka kaj David, kaj tiam ni ĉiuj preskaŭ tuj post ilia alveno iris arbaren por kolekti fungojn!

Al mi Pavel plurfoje estis bonvena apogo kiam mi dum la 1970-aj jaroj venis ofice por partopreni la internacian industri-foiron en Brno. Cetere ni komune havis grandan intereson en klasika muziko kaj i.a. li malfermis miajn orelojn al la muziko de Bohuslav Martinů, naskito de urbo Polička, najbara al Litomyšl.

Profesie Pavel Tichý estis inĝeniero kun ekzameno de la Teknika Universitato en Prago kaj posta doktoriĝo pri silikat-teknologio (vitro). Jam en jaro 1961 li en la hejmurbo Litomyšl eniris la firmaon Vertex kaj ties novan esplorsekcion por vitraj fibroj. Tiun okupon li tenis ĝis pensiiĝo.

Persone Pavel estis kredanto, trankvila en Jesuo Kristo kaj ano de la Fratara eklezio (*Cirkev bratrská)*, en kies loka komunumo li dum periodo kunagis kiel laika predikanto.

Nun li ripozu en Dia paco
Åke Ahlrén

# Ni kunigu la manojn

Decidu ni
kune revi
kune preĝi
kune labori
kune konstrui
survoje al mondo
de paco kaj justeco
por ĉiuj homoj

Kunigu ni
ĉiujn manojn
por ŝanĝi la mondon
ĉiujn manojn
por kulturi la kampojn
ĉiujn manojn
por elsarki herbaĉon
ĉiujn manojn
por dividi nian ĝojon

Batalu ni
ridante kaj ridetante
meze de agreso
homoj gajaj kaj esperantaj
liberaj de timo

Jen la pura graco
kiun donas al ni Dio

Rigardu viajn manojn
vidu tuŝon kaj teneron
rigardu viajn piedojn
vidu vojon kaj direkton
rigardu vian koron
vidu la fajron kaj amon

Jen la mondo de Dio
Lin ni servos sur tero

Teksto el Guatemalo de nekonata aŭtoro

Tradukis: Jacques TUINDER